

Sylvain Lelarge: La Frisaj sportoj: modernaj formoj de kamparanaj kaj maristaj aktivaĵoj

Frislando, kadre de sia aparta kulturo, konas apartajn sportojn, agnoskatajn en la resto de Nederlando kiel specife frisaj, sed kiel tradiciaj popolsportoj bonvenigataj kaj praktikataj fare de pli kaj pli da sportistoj en- kaj eksterlande.

Ni prezentas al vi ĉi-sube kvar el ili: la stangosaltadon, la polmpilkcludadon, la sketadon kaj la veladon per tradiciaj velŝipoj.

Stangosaltado (en la frisa lingvo ‘fierljeppen’; en la nederlanda ‘polsspringen’)

Ne nur en Frislando, sed en granda parto de Nederlando, la pejzaĝo konsistas el polderoj, tio estas kampoj en la plimulto de la kazoj troviĝantaj pli malalte ol la marnivelo, kaj ĉirkaŭataj de pli-malpli larĝaj kanaloj (kiuj ebligas la forpumpadon de la troa akvo). Do la transsaltado de tiuj kanaloj utilis por eviti longajn kromvojojn. Tiun transsaltadon oni faris helpe de longa ligna stango

kiun oni – kurante por akiri sufiĉan rapidecon – pikis mezen de la kanalo por transsaltegi ĝin tenante sin ĉe la supra parto de la stango. La frisa nomo – ‘fierljeppen’ – signifas ‘forsalti’. La frisa lingvo havas multajn similecon kun la angla, en kiu la sama koncepto nomiĝus ‘far leaping’.



Nuntempe la stangosaltado iĝis nacia – eĉ internacia – sporto, kiu praktikiĝas precipe en Nederlando kaj Belgio. La salto mem okazas jene: komence oni enpikas la stangon mezen de la kanalo, iom diagonale al la alvenflanko. La saltonto komencas sian salton per tre vigla kurado (pli malpli 30 metrojn longa) kaj poste saltas al la stango (la ensalto nomiĝas ‘insprong’), firme kaptas ĝin kaj supergrimpas kiom rapide kaj alten li kapablas, por poste fali al la alia flanko sur sablon. Lastmomente la sportisto saltas ankoraŭ por aldoni distancon: tio estas la tielnomata elsalto (‘uitsprong’).



La unua oficiala konkurso okazis dum la jaro 1767 en Baard kaj organiziĝis fare de riĉa vidvino de loka nobelulo. Kiel moderna sporto, la stangosaltado ekzistas ekde 1956. Ĝis 1975 oni uzis lignajn stangojn maksimume 10 metrojn longajn. Poste anstataŭis ilin aluminiuj stangoj, kiuj devis esti pli mallongaj ol 12,50 metroj. En 2006 oni oficiale transiris al karbostangoj maksimume 13,25 metrojn longaj. La rekordaj saltoj longas 21,55 metrojn por la viroj kaj 16,91 metrojn por la virinoj.

Spektu mallongan filmon pri tiu sporto al klakante al <https://www.youtube.com/watch?v=YP32iWoqjNQ>



Polmpilkudado ('keatsen' en la frisa lingvo, 'kaatsen' en la nederlanda)

Tre populara sporto en Frislando, ĝi estas ankaŭ en similaj formoj larĝe praktikata en Belgio, Francio, Vaskio, Hispanio (Valencia), Italio kaj Kolombio (inter aliaj sudamerikaj landoj). En Francio en Belgio estis dum jarcentoj konata kiel la '*Jeu de paume*' (polmludo). Oni devas lanĉi la pilkon - pere de la polmo – tiel, ke la kontraŭulo ne povu relanĉi la pilkon validmaniere. Tiu ludo tre populariĝis en Nederlando kaj jam dum la 16a kaj 17a jarcentoj konstruiĝis multaj polmpilkudejoj, ofte per tegmento protektitaj kontraŭ la malbona vetero.

La frisa polmpilkudo ludiĝas sur herbejo 61 metrojn longa kaj 32 metrojn larĝa. La ludejo limiĝas per 4 centimetrojn larĝa, blanka, plasta linio. Vidu ĉi-flanke desegnaĵon de oficiala tereno.



Polmpilkuda teamo (nomiĝas 'parturo') konsistas el 3 personoj kiuj dividas inter si kvar rolojn: temas pri la unua frapanto, dua frapanto, antaŭa limludanto, kaj malantaŭa limludanto. Du parturoj ludas unu kontraŭ la alia. Tiu venkas kiu unua atingas kvar poentojn. La plej grava


konkurso okazas ekde 1853 ĉiujare en Franeker. Ĝi estas tiu sportkonkurso kiun oni de plej longa tempo organizas en la mondo.

La polmpilkudado influis multmaniere la frisan lingvon, ekzemple per esprimoj kiel '*op 'e dea stean*', kiu signifas 'stari sur la morto', kiam unu parturo preskaŭ finvenkas. Alia ekzemplo, en la nederlanda: '*Wie kaatst moet de bal verwachten*' (= 'kiu polmpilkudas prepariĝu ricevi la pilkon!').

Ĝin oni uzas por esprimi, ke iu kiu ion faras, povas antaŭvidi reagon. Filmetoj pri tiu sporto vidiĝas (jaron 1953) je

https://www.youtube.com/watch?v=eXRq_C5M8BA&list=PLW4GWME8wHGWUKgzxf1rkJDbnr70EU-Yh&index=13 kaj (jaron 2008)

<https://www.youtube.com/watch?v=oOGpP8Nc8y8&list=PLW4GWME8wHGWUKgzxf1rkJDbnr70EU-Yh&index=3>




Sketado

En lando en kiu la transportado de varoj kaj homoj okazas grandparte laŭ la akvojoj - kaj certe okazis dum la pasintaj jarcentoj, kiam la klimato estis rimarkinde pli malvarma - veturi sur glacio estis praktika maniero iri kien oni celis. Apud la sketĉaroj, trenitaj per ĉevalo, uziĝis de jarcentoj la sketiloj, al kiuj la frisoj donis specialan formon, multe pli longan ol en la aliaj partoj de la lando.

La sketiloj nuntempe konataj kiel 'frisaj' ricevis sian definitivan formon dum la 19a jarcento. En 1875 oni signife plibonigis ĝin per plilongigo de la ŝtala glitklingo. Tiam famiĝis la tielnomata 'frisa transkuranto' (en la nederlanda 'Friese doorloper'). Dum la jaroj 70aj kaj 80aj de la pasinta jarcento la sportistoj uzis sketojn nomitajn 'noren' (= nordaj), kaj nuntempe ili uzas la 'faldsketojn kiel ĉi dekstre >. Dum la olimpikaj ludoj la nederlandaj sportistoj (legu 'frisaj sportistoj') regule gajnas ĉiujn medalojn, ĝis tiu grado, ke estas sufiĉe senesperige por la teamoj de la aliaj landoj.





Sed la vera evento por ĉiu Friso, estas kaj restas la ‘Rondo de la 11 urboj’: la fama ‘Elfstedentocht’, kiu transiras la 11 frisajn urbojn en cirklo 200 kilometrojn longa, plejparte sur natura glacio. Vidu maldekstre la trajekton, kiu komenciĝas en Ljouwert (Leeuwarden en la nederlanda), kaj trairas Snits (Sneek), Drylts (IJlst), Sleat (Sloten), Starum (Stavoren), Hylpen (Hindeloopen), Warkum (Workum), Boalsert (Bolsward), Harns (Harlingen), Frentsjer (Franeker), Dokkum (Dokkum) por denove atingi Ljouwert. Plurcentoj da glitkurantoj partoprenas ĝin, kaj ĝi estas tiom malfacila, ke nur finkuri la cirklon jam estas honoro. La rekordo apartenas al Evert van Benthem, kiu finfaris la trajekton en 6 horoj kaj 47 minutoj. La plej malnova mencio pri ĝi, kiu tiun cirklon senhalte glitkuris datas de 1763.

Ne ĉiujare eblas organizi la konkurson, ĉar la glacio devas esti sufiĉe fidinda. Ekde 1909, kiam la konkurso oficialiĝis, ĝi okazis nur 15 fojojn, en 1909, 1912, 1917, 1929, 1933, 1940, 1941, 1942 (rimarku kiom malvarmaj estis la militjaroj), 1947, 1954, 1956, 1963, 1985, 1986 kaj lastfoje 1997 (kun 17000 glitkurantoj). Jam de 18 jaroj atendas la sportistoj vintron sufiĉe malvarman por denove

konkursi. Do kompreneblas, ke estos eventego kiam finfine eblos. Feliĉe estas sufiĉe da aliaj okazoj kaj manieroj trejniĝi kaj la frisaj sketistoj restos plej verŝajne ankoraŭ longe la plej rapidaj glitkuristoj de la mondo.

Filmon pri la fino de la lasta konkurso (1997) oni povas spekti klakante al <https://www.youtube.com/watch?v=CcXoSYK8mn0>



Velŝipumado per skûtsjes

Veli ('sile' en la frisa lingvo, 'zeilen' en la nederlanda) estas memkompreneble vivnecesa okupaĵo en tuta Nederlando. Tamen, Frislando disvolvis rimarkindan tradicion tiurilate. La tradiciaj frisaj velŝipoj nomiĝas 'skûtsjes' (en la nederlanda 'schuitjes') kaj utilis por transportado de varoj (inter aliaj: sterko, grundo kaj terpomoj) en Frislando. La ŝipisto kaj lia familio loĝis en la ŝipo. La ŝipojn la familianojn tiris laŭ la kanaloj kiam tio estis necesa.



Tiajn ŝipojn oni konstruis kaj uzis ekde la 18a jarcento ĝis la jaroj 1930. Ili longis inter 12 kaj 20 metrojn, kaj averaĝe larĝis 3,5 metrojn. Dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj de la pasinta jarcento oni komencis ekipi la ŝipojn per motoro, sed estas nur post la dua mondmilito, ke la veloj komplete forlasiĝis, almenaŭ por la transporta laboro. La *skûtsjes* malaperis kiam la kanalŝipoj komencis estis tiom grandaj kaj ekipitaj de tiom fortaj motoroj, ke ilin konkurenci ne plu eblis. Dum la kvindekaj jaroj, multaj el tiuj ŝipoj, kiuj tiam utilis kiel surakvaj loĝejoj, denove ekipiĝis per mastoj kaj veloj kaj surakviĝis, ĉu fare de privataj ŝatantoj, ĉu de organizaĵoj celantaj protekti tiun kulturan heredaĵon.



Skûtsjes havas nur unu maston kaj du flankajn stabiligojn. Nuntempe organiziĝas ĉiujare konkurso, la bone konata 'skûtsjesilen'. Averaĝe partoprenas ĝin 60 ŝipoj. Ĉar kelkaj el ili estis tiel transformataj, por ke ili pli rapide navigu, oni uzas por ili sistemon de handikapoj, tiel ke la konkurso estu justa. La kriterioj estas la pezo, la formo, la rezisto de la akvo kaj la surfaco de la uzitaj veloj.

Filmon pri konkurso de *skûtsjes* oni povas spekti alklakante al <https://www.youtube.com/watch?v=9ahIpic7ZLY>

